

La heroo vivo de Henri Dunant, 8-a parto
Claude Gacond, 103-a radioprelego, 1964.11.18 & 21

Atentu esperantistoj ! Ĉi tie parolas la Svisa Kurtonda Radiostacio. Claude Gacond raportas pri la heroo vivo de Henri Dunant. Vi aŭdas la okan elsendon.

Antaŭ la dekmiloj da vunditoj, kiuj atendas ĉu sukuron, ĉu morton, Henri Dunant ne reagas kiel la ceteruloj. Lin imponas ne la multnombro, sed la ideo, ke vunditaj soldatoj, kiuj kuraĝe oferis sian vivon pro ordonoj ricevitaj, estas forlasitaj sen sanitara helpo.

Dum la ankoraŭ servokapablaj soldatoj rapide kaj sen postsopiro forlasas la batalejojn por iri festi sian venkon en ne ankoraŭ detruitan vilaĝon, dum la kuracistaro de la armeo ricevas la ordonon forgesi la viktimojn de Solferino por pli strategia tasko (ni ne forgesu, ke Solferino ne signifis definitivan venkon super la aŭstria imperiestro), dum la loĝantaro ne scias, kion entrepreni en tia situacio, unu homo, kiu neniel respondecas pri tiu konflikto (li eĉ estas fremdulo), rifuzas tro logike pensi pri sia malforteco kaj eteco antaŭ la graveco kaj enormeco de la necesa sukuro.

Li konstatas faktojn neakcepteblajn. Kaj li tuj ekagas. Li ne pensas pri la signifo de sia agado. Tion li faros poste, kiam li vidos la unuajn fruktojn de sia laboro. Li eklaboras nur por respondi al la alvoko de tiu interna voĉo, kiu ne povas silenti antaŭ tiom da homa mizero. Li eĉ provas ne tro pensi, ĉar li sentas, ke logikaj konsideroj nur povus lin instigi malobei tiun internan alvokon, kaj li ne volas fariĝi malhomo.

Fernand Gigon, aŭtoro de biografio de Henri Dunant, konstatas, ke « *Ĉiam, kiam dum la jarcentoj individuo dediĉis sian tutan personecon, ĝin oferante ankaŭ tute al la servo aliula, tiam la historio turnis unu el siaj paĝoj.* » En tiu konstato estas granda vero, kiun la vivo de Henri Dunant lumigas.

Ĉiam per citaĵoj el **Rememoro pri Solferino** ni sekvu la vojon de nia kuraĝulo :

« *La kompatindaj vunditoj, kiujn oni eklevas... estas palaj, lividaj, senfortaj.*

« *Unuj, ĉefe tiuj, kiuj estis grave trafitaj, idiote rigardadas ; ili ŝajne ne komprenas tion, kion ni al ili diras ; sovaĝe ili turnas sian rigardon kontraŭ siaj helpantoj.*

« *La aliaj en gravega spasma nervostato estas skuataj de konvulsiaj tremadoj.*

Aliaj ankoraŭ, kun faŭkantaj vundoj, kie inflamo jam eklaboras, dolorstultas : ili alvokas mortigon kaj, kun streĉitaj vizaĝoj, ili tordas sin en lasta agonia premiĝo.

Tiam okazas plorindaĵoj. Estas akvo, estas nutraĵo ; kaj tamen la vunditoj mortas pro malsato kaj soifo ! Estas pansaĵoj abunde, sed ne sufiĉas la manoj por ilin meti sur la vundojn !...

« *Necesas do, bone malbone funkciigi volontularon* » konkludas Henri Dunant. Li tamen aldonas : « *Sed tio ne facilas meze de tia malordo, al kiu aldoniĝas la paniko de la loĝantaro de Castiglione, paniko, kies rezulto estas pligravigo de la mizera stato de la vunditaro.* »

La arme-estroj lasis la organizadon de sanitara helpo al la hazardo. Henri Dunant helpas la hazardon. Sen ordono oficiala, sen labor-rajtigilo, li iras de preĝejo al preĝejo, de hospitalo al hospitalo, por kunordigi la laboron de improvizitaj flegistoj kaj por helpi la rarajn kuracistojn, kiuj restis kaj tranĉas membrojn kaj membrojn somnambule.

Kie malespero aŭ laciĝo ekregas, novan kuraĝon li alportas, kie homoj mankas, li rapide instruas simplajn sanitarajn praktikojn. Kaj antaŭ ĉio li tre severe kontrolas la sintenon de la flegistoj rilate la vunditojn de la malamikaj armeoj.

Ni legas en **Rememoro pri Solferino** : « *La virinoj de Castiglione, vidante, ke mi faras nenian diferencigon pri nacieco, sekvas mian ekzemplon kaj manifestas la saman bonvolon*

La heroa vivo de Henri Dunant, 8-a parto
Claude Gacond, 103-a radioprelego, 1964.11.18 & 21

por tiuj homoj el tiel diversaj devenoj. « Tutti frатели » (Ĉiuj fratoj) ili ripetas kun emocio. Omaĝo al tiuj kompatemulinoj. »

Preskaŭ cent paĝoj de lia libro estas dediĉitaj al la suferoj de la vunditoj, kiuj ofte ne mortis pro siaj vundoj, sed pro manko de kuracado. Kiam la situacio fariĝos preskaŭ senesperiga, la fondonto de la Ruĝa Kruco malobeos la policajn ordonojn pri dormosignalo kaj riskos sian vivon dum nokta veturado por iri rakonti al la armeestraro la mizeregon de la vunditaro.

En leteroj, kiuj vokas helpon, li avertas siajn ĝenevajn amikojn de la **Societo pri almozoj** pri sia laboro. Tiuj paperoj diskonigas lian kuraĝon kaj helpas al la fondo, en Ĝenevo mem, de la Ruĝa Kruco.

Ni eniru unu el la preĝejoj :

« Sur la slabaro kuŝas flankon ĉe flanko francoj kaj araboj, germanoj kaj slavo. Kelkaj, kiujn oni provizore metis ĉe la fono de kapelo, ne plu trovas forton sin movi. Aliaj, pro lokomanko, ne povas moviĝi en la mallarĝa spaco, kiun ili okupas. Ĵuroj, blasfemoj kaj krioj nepriskribeble tondras sub la volvoj de la sanktejo. « Ha, sinjoro, kiom mi suferas, diradas al mi tiuj malfeliĉuloj, oni forlasas nin, oni nin lasas morti mizere, ni tamen kuraĝe batalis. » Malgraŭ siaj laciĝoj, malgraŭ noktoj de maldormo, la ripozon ili ne trovas, ĝi forlasis ilin. En sia mizerego ili petegas helpon de kuracisto, aŭ ili sin rulas pro malespero en konvulsioj, kiuj finiĝos per tetano kaj morto. »

En alia parto de sia libro Henri Dunant aldonas :

« En tiuj multnombraj hospitaloj de Lombardio oni povas ekvidi kaj ekkompreni je kiu prezo sin aĉetas tio, kion la homoj pompe nomas gloron, kaj je kiu prezo estas pagata tiu gloro ! »

Konklude al tiu **Rememoro pri Solferino** li ankoraŭ aldonas : *« Ekster ĉia milita kaj glorama vidpunkto tiu batalo de Solferino restas, je vidpunkto de ĉiu neŭtrala kaj senpartia observanto, nura eŭropa katastrofo. »*

Ni multobligos la tekston de tiuj elsendoj pri la heroa vivo de Henri Dunant kaj ĝin sendos al la petantoj.

Vi aŭdis Radio-Svislandon. Claude Gacond diras al vi :

Ĝis reaŭdo !

-oOo-